

informilo por interlingvistoj

ipi

28-a jaro (tria serio) | n-ro 107 (2/2019) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj Esperantic Studies Foundation

Contents

1. Mesaĝo de la redakcio	2
2. Esplora posteno	2
3. Esperanto Tago Buchanan, Universitato de Liverpolo, 2 aprilo 2019.....	2
4. Konsultiĝo de Esperantologoj estas planata por Lahtio	2
5. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj.....	3
Erich-Dieter Krause. 2018. <i>Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch in zwei Bänden, Band 1 (A-K)</i> . New York: Mondial.	4
6. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj.....	7
7. Disertacioj	8
8. Novaĵoj pri periodaĵoj	9
9. ESF-Historio: kunlaborantoj serĉataj	9
10. La Studo-Grupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj invitas vin al Simpozio pri Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo.....	9
11. Alvoko pri artikoloj: Speciala numero pri aganteco en lingvoplanado kaj politiko	11
12. Instruista trejnado en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net.....	12
13. Biblioteka apogo Bachrich subvencias 15 bibliotekojn.....	12
14. Esperantologia Konferenco 2019.....	13
15. Staatsbibliothek zu Berlin	13
16. UMEA: Medicinaj disertacioj en Esperanto?	13
17. Konferenco: Multdisciplinaj Aliroj al Lingvopolitiko kaj Lingvoplanado	14
18. Misasertoj pri Esperanto.....	14
19. Afriko en mondo de lingvoj.....	15
20. Esperanto-kurso ĉe Universitato Allame Tabataba'i, Irano	16
21. Esperanto en konferenco de Lingva Societo de Barato	16
22. Esplorprojekto pri la frua Esperanto-movado en Eŭropo.....	17
23. Konferenca partopreno.....	17
24. Nova redaktoro ĉe LPLP	17
25. Universitato de Vieno ricevis la paperojn de Eugen Wüster	18
26. Esperanto en universitatoj.....	18
27. Memorfesto ĉe ĉina Esperanto-muzeo.....	19

28. ILEI 70-jara.....	19
29. Komisiono pri Universitata Agado formiĝis	20
30. 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio	20
31. Kongreso de Esperanto ĉe Shenyang-universitato	20
32. Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de Internacia Patrinlingva Tago, 21 februaro 2019	21

1. Mesaĝo de la redakcio

Bonvenon al tiu ĉi nova numero de Ipl. Ĝi estis ĉefe redaktita de Humphrey Tonkin, kun helpo de Angela Tellier kaj Ĵenja Amis kaj kun subteno de Esperantic Studies Foundation, kaj celis kolekti en unu loko informojn kiuj lastatempe atingis nin. Se vi trovas ĝin utila, bonvolu nepre mem kontribui per informoj, novaĵoj, bibliografieroj ktp. *Informilo por Interlingvistoj* aperas paralele kun *Information for Interlinguists*, nia anglalingva ĝemelo, kun esence samaj informoj. Viaj novaĵoj estas sekve akcepteblaj egale en Esperanto aŭ en la angla.

2. Esplora posteno

Skribas d-ro Michele Gazzola (Ulster University): “UA (University Alliance) Doctoral Training Alliance (DTA3) proponas Doktoriĝan Stipendion Marie Skłodowska-Curie en [School of Applied Social and Policy Sciences at Ulster University](#). La doktoriĝa studento laboros sub gvido de mi mem, plus prof. G. Marnoch (both at Ulster University), kaj d-ro B. Carey (Trinity College Dublin) pri projekto Lingvopolitiko, lingva justeco kaj inkludo ([Language policy, linguistic justice and inclusion](#)).”

Pliajn detalojn vi trovos en la aktuala numero de *Information for Interlinguists*. Temas pri anglalingva projekto en anglalingva universitato.

3. Esperanto Tago Buchanan, Universitato de Liverpolo, 2 aprilo 2019

La ĉi-jara Tago Buchanan okazos la 2an de aprilo 2019, 11.00 - 18.00, Universitato de Liverpolo, Britio. Gastpreleganto: Profesoro Geoffrey Greatrex, Universitato de Otavo, Kanado, estrarano de ESF: 'Imperiestroj kaj orientaj militkampanjoj' (en Esperanto). Aliaj prelegoj: Jessica Iubini-Hampton, doktoriĝanta studento Buchanan, Universitato de Liverpolo: 'La dokumentado de minoritataj lingvoj' (en la angla); D-ro Damien Hall, Universitato Newcastle, UK (titolo konfirmota, en la angla); gustuma sesio pri Esperanto. <https://www.liverpool.ac.uk/events/event/?eventid=91416>

4. Konsultiĝo de Esperantologoj estas planata por Lahtio

Pasintjare, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono, kvindeko da fakuloj pri aspektoj de Esperantologio kunvenis, laŭ invito de ESF kaj CED, en Nitobe-simpozio pri la instruado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj. La aranĝo montriĝis tre utila, i.a. por stimulo de novaj kunlaboroj. ESF nun planas kunvoki similan sed pli mallongan renkontiĝon dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando.

En 2018, la aranĝo komenciĝis tuj post la fermo de la UK, en sabato, kaj daŭris ĝis la posttagmezo de dimanĉo. Ĉi-jare temos nur pri duontaga aranĝo, kiu komenciĝos per lunĉo en sabato (27 julio) kaj finiĝos tiun vesperon per vespermanĝo. La lingvo de la kunveno estos Esperanto. La kunveno estos senpaga. Se vi ŝatus ricevi inviton, bonvolu kontakti Angela Tellier, ĉe angela.tellier@esperantic.org.

5. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj

Timothy Reagan. 2019. *Linguistic Legitimacy and Social Justice*. Palgrave Macmillan.

<https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-030-10967-7#about>

Tiu ĉi anglalingva libro ekzamenas la naturon de la homa lingvo kaj la ideologion de lingva legitimeco – la komuna komplekso de kredoj pri lingvaj diferencoj kiu kondukas al la malakcepto de certaj lingvaj variantoj kaj la validigo de aliaj. Ĝi esploras larĝan gamon de lingvoj kaj dialektoj kiuj pro diversaj kialoj estas aŭ estis konsiderataj malaltstatusaj, inkluzive de afrikusona angla, “hispanĝla”, Usona Gestolingvo, jida, Esperanto kaj aliaj konstruitaj lingvoj, indiĝenaj lingvoj en postkoloniaj noveŭropaj socioj, kaj la afrikansa kaj rilataj lingvaj demandoj en Sud-Afriko.

Max Hans-Jürgen Mattusch. 2019. *Ist Esperanto noch aktuell ? : Ein Essay über ein kontrovers diskutiertes sprachliches Projekt*. Google Books on Demand.

https://books.google.com/books?id=tB-KDwAAQBAJ&lr=lang_en&source=gbs_navlinks_s

La arte kreita internacia lingvo Esperanto estas unu el la plej kontestataj projektoj en la lingvistika kampo kaj estas diskutata ankoraŭ feroce malgraŭ siaj pli ol 130 jaroj de ekzisto. Eĉ se multaj el la ideoj de ĝia iniciatinto Zamenhof, kiel ekzemple mondo sen militoj aŭ universala religio, ne realiĝis, ĝi kreis bazon por facile lernebla neŭtrala lingvo, kion atestas, malgraŭ ĉiaj specoj de klopodoj de subpremo, monda parolkomunumo. Esperanto kiel dua lingvo (aldone al la denaska lingvo), ne estas nur lingvo interpreta kun monda funkcio, sed samtempe lingvo kun monda misio de paco. Esperanto vivas, kaj sekve memorigas ke en tuttera vivmedio kie aktuale la angla lingvo dominas, demokrata kaj liberala kompreno interhoma ne devas resti utopio, ĉar ĝi donas al ĉiuj la ŝancon egalece partopreni en tutmonda komunikado kaj estas nenies denaska lingvo.

Alexander Korženkov. 2019. *Ludvík Lazar Zamenhof - život, dílo, ideály*. Prago: KAVA-PECH. _Koncizigita versio de *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de L.L. Zamenhof*. Kun notoj por la ĉeĥlingva publiko.

Prezo: 12.30 EUR. <http://katalogo.uea.org?inf=9695>

Antaŭ kelkaj jaroj ESF lanĉis programon por tradukigi en aliajn lingvojn mallongigitan version de la biografio de Zamenhof verkita de Korženkov. Jen la ĉeĥlingva traduko, kiu sekvas la pasintjare eldonitan portugallingvan tradukon.

Michele Gazzola, Bengt-Arne Wickström and Torsten Templin, eds. 2018. *Language Policy and Linguistic Justice: Economic, Philosophical and Sociolinguistic Approaches*. New York/Berlin: Springer (2018).

Lingvaj politikoj estas ĉiam pli agnoskataj kiel necesa komponanto de multaj decidoj prenitaj en la labormerkato, edukado, minoritataj lingvoj, movebleco kaj socia inkludo de migrantoj. Ili povas influi la demokratian regadon de politikaj organizoj, kaj ili povas aŭ firmigi aŭ malpliigi neegalecojn. Ĉi tiuj estas la centraj temoj de ĉi tiu libro. Ekonomikistoj, filozofoj, politikaj sciencistoj kaj sociologoj diskutas - el interdisciplina perspektivo – pri la distribuivaj sociekonomiaj efikoj de lingvaj politikoj, ilia efiko sur justeco kaj neegaleco ĉe la nacia aŭ internacia nivelo, kaj same ankaŭ la rilato inter lingvaj elektoj kaj inkluziva aliro al publikaj servoj. La gamo de sociaj kaj ekonomiaj aferoj levitaj de lingva diverseco en nuntempaj socioj estas granda, kaj ĉi tio postulas novajn alirojn por trakti ilin. Ĉi tiu libro provizas novan

materialon por krei pli bonajn, pli efikajn kaj pli justajn politikojn por administri lingvan diversecon en diversaj lokoj ...

R.M.W. Dixon. 2016. *Are Some Languages Better than Others?* Oxford: Oxford University Press.

Tiu ĉi anglalingva libro celas respondi demandon kiun multaj lingvistoj hezitis starigi: ĉu iuj lingvoj plibonas ol aliaj? Ĉu eblus diri, ekzemple, ke pro tio, ke la germana havas tri genrojn kaj la franca nur du, la germana estas en tiu ĉi rilato pli bona lingvo? La jaraŭara, parolata en Amazonio, havas du manierojn por indiki posedon: unu por parto (ekz. la piedo de Patro), alian por io kion oni posedas kaj povas fordoni aŭ vendi (ekz. la tranĉilo de Patro). Ĉu do ĝi estas pli bona lingvo tiurilate ol la angla, kiu markas ĉiuspecan posedon laŭ la sama maniero?

Erich-Dieter Krause. 2018. *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch in zwei Bänden, Band 1 (A-K)*. New York: Mondial.

La *Plena Vortaro Esperanto-Germana* kun siaj proksimume 150.000 artikoloj enhavas ne nur la kompletan Esperanto-leksikon de la ĉiutaga lingvo kun multnombraj vortkunmetoj kaj ekzemplodonaj frazoj, sed ĝi ankaŭ prezentas, grandskale, leksikon el ĉiuj faklingvaj sferoj, ankaŭ de la nove kreitaj sciencobranĉoj. La leksika materialo konsiderinde superas tiun prezentitan en la *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, la aktuala unulingva normverko por Esperanto. La vortaro estas la rezulto de pli ol kvindekjara leksikologia kolektado kaj esplorado de plej variaj tekstoj, inter kiuj Esperanto-publicaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tio ĉi konsekvence rezultigis ekzemple, ke ankaŭ la ekstereŭropaj influoj al Esperanto estas adekvate reflektataj. La vortaro krome konsideras la apartajn uzojn de la germana lingvo en Aŭstrio kaj Svislando kaj mencias, certagrade, ankaŭ regionismojn. S.F.

Alvino E. Fantini. 2019. *Intercultural Communicative Competence in Educational Exchange: A Multinational Perspective*. Routledge.

<https://www.routledge.com/Intercultural-Communicative-Competence-in-Educational-Exchange-A-Multinational/Fantini/p/book/9780815369677>

Alvino Fantini, emerita profesoro ĉe SIT Graduate Institute kaj membro de la Konsilantaro de ESF, lastatempe verkis gravan studon pri eduka interŝanĝo kaj eksterlanda studado. La verko enhavas du esplorprojektojn kiuj ekzamenas la naturon de interkultura komunika kompetento (ICC), ĝian evoluon dum interkultura interŝanĝo kaj la efikon de tiuj spertoj je partoprenintoj dudek jarojn poste. La esploro estis faritaj en ok landoj (Brazilo, Ekvadoro, Germanio, Britio, Irlando, Japanio, Svislando kaj Usono) kaj tuŝis pli ol 2000 individuojn kaj 200 gastigajn familiojn.

Cyril Robert Brosch kaj Sabine Fiedler, red. 2018. *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2018 (JGI 2018)*. Interlinguistische Beiträge, u.a. der 27. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL), 10. -12. November 2017 in Berlin. La ĉefa temo estis Mehrsprachigkeit in Europa (Multlingveco en Eŭropo). La artikoloj estas en la germana. Jen resumo en Esperanto.

Guilherme Fians. Die Neutralität einer politischen Partei: Sprachpolitik und Aktivismus für Esperanto in den Wahlen zum Europäischen Parlament / La neŭtraleco de politika partio: Lingvopolitiko kaj aktiveco por Esperanto en la balotoj al la Eŭropunia Parlamento

Ĉar la Esperanta lingvokomunumo ne povas kalkuli je laŭ generacia transdono garantianta ĝian daŭron, la Esperanto-movado aperas kiel provo stabiligi tiun komunumon varbante por la lingvo kaj instigante okupiĝadi pri ĝi. Tiusence unu el la plej interesaj frakcioj de la neŭtrala Esperanto-movado estas la politika partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiu startigas kandidatojn

por la balotoj al la Eŭropunia Parlamento kaj utiligas la balotajn kampanjojn por reklami la lingvon. Per sociantropologia aliro kaj bazita sur longdaŭra kapolaboro inter parolantoj kaj subtenantoj de Esperanto en Francujo, mi esploros kelkajn aspektojn de la agado de EDE, kun speciala atento al la disputo, kiel politika partio povas resti neŭtrala? De tiu unua demando mi esploros la diversajn difinojn de neŭtraleco troveblajn ĉe la Esperantistoj, kiel maniero aliri la demandon, kiel koncepto de neŭtrala politiko estas strategie utiligata kiel helpilo en la diskutoj inter la partiano. Mi krome esploros, kiel la rezultoj de la partia agado estas perceptataj de la membroj rilate sukceson kaj malsukceson, kaj kiel la problemo de neŭtraleco kaj politika engaĝiĝo reaperas en tiu diskuto.

Sabine Fiedler. Esperanto und die Mehrsprachigkeit / Esperanto kaj multlingveco

La Esperanto-komunumo ŝanĝis siajn lingvo-politikajn kaj ideologiajn celojn dum sia 130-jara historio reage al evoluoj en internacia lingvokomunikado kaj antaŭ ĉio pro la rolo de la angla kiel internacia lingvafrankao. Ekde la fino de la 1960-aj jaroj la Universala Esperanto-Asocio (UEA) montras klaran orientiĝon al multlingvismo, kiun pravas la rezolucioj de la Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK). La unua parto de tiu ĉi artikolo rigardas tiujn evoluojn detale, dum la dua parto okupiĝos pri la demando kiel multlingvismo montriĝas en la lingvokomunumo hodiaŭ. La terenoj studataj estas interalie la fakta lingvouzo, traduka literaturo, lingvo-lernado, la uzo de Esperanto kiel laborlingvo kaj metodoj de lingvoesplorado.

Michele Gazzola, Sabrina Hahm kaj Bengt-Arne Wickström. Sind Fremdsprachenkenntnisse mit dem Einkommen und der Beschäftigung verbunden? Empirische Evidenz aus Deutschland und aus der Welt / Ĉu estas rilato inter konoj de fremdlingvoj kun salajroj kaj dungiteco? Empiriaj trovaĵoj pri Germanio kaj la mondo.

En la artikolo temas pri la rilato inter lingvo, homa kapitalo kaj labormerkato. La artikolo komenciĝas per ĝenerala diskuto pri la influo de lingvo al konsumado kaj produktado. Lingvokonoj modeliĝas kiel homa kapitalo, kiu influas kaj la konsumon kaj la produktivon en la labormerkato. Substrekindas, ke la valoro de lingvokonoj dependas kaj de postulo kaj de oferto de la lingvaj kompetentoj. Post traktado de la abunda literaturo pri tiu temo, precipe pri regado de diversaj fremdlingvoj kaj sukceso en la labormerkato, la empiriaj trovaĵoj estas prezentataj. En multaj okazoj fremdlingvaj konoj signife influas salajron kaj dungitecon. Baze de aktualaj datoj el Germanujo okazas priskriba analizo de la rilatoj inter konoj de la angla lingvo kaj enspezo kaj dungiteco en la germana labormerkato.

Bernd Krause. Verortung von Farben und Bildung von Farbwörtern in ausgewählten philosophischen Planspracheprojekten / La loko de koloroj kaj la formado de kolorvortoj en elektitaj planlingvaj projektoj

Filozofiaj lingvoj baziĝas sur individuaj konceptoj de la mondo, tio estas sistema ordigo de ĉiuj konataj nocioj kaj aĵoj. Sekvante tiun sistemon, ĉiuj vortoj de la nova lingvo havas firman, neŝanĝeblan lokon. Tiu artikolo kontribuas al la demando, kie kolorvortoj troviĝas en la sistemoj de kelkaj elektitaj filozofiaj lingvoj, kiuj koloroj ekzistas kaj kiel la novaj vortoj por koloroj estas formitaj. La studomontras, ke la plej multaj filozofiaj lingvoj havas bazajn vortojn por nur sep koloroj (Sotos Ochando, frua Ro), reprezentantaj la spektron de la fizika lumo. Kelkaj lingvoj eĉ havas nur kvin vortojn (Wilkins, malfrua Ro, aUI). La elstaranta escepto Ygyde per uzo de tabelo, kiu enhavas variajn intensgradojn de mikadoj inter tri bazaj koloroj, permesas la formadon de 60 kolorvortoj. La vortfarado estas rezulto el la kombino de sufiksaj silaboj aŭ solaj literoj, el kiuj kelkaj ĉiam havas fiksjajn signifojn (aUI), sed aliaj, aldonitaj laŭ la alfabeto vico, nur servas por ordigi la novajn vortojn – la kolorojn kutime laŭ la vico en la ĉielarko (Wilkins, Sotos Ochando, Solresol, Ro) – aŭ por montri gradojn de la mikado kun najbaraj koloroj (Sotos

Ochando). La kolorvortoj en Solresol, lingvo, kiu eĉ povas esti komunikata per sep koloroj, ordigitaj laŭ la vico en la spektra lumo, ne havas rilaton al iu ajn sistemo. Samepokaj kolorteorioj (Goethe, Lambert, Runge) preskaŭ ne havis ian influon al iu filozofia lingvo, nur Ygyde reflektas la kontraŭajn principojn de adicia kaj subtraha kolorteorioj.

Klaus Schubert. Apriorische und aposteriorische Plansprachen – eine Quellenrecherche / Aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj – esploro pri la origino de la klasifiko.

Planlingvojn oni kutimas klasi kiel apriorajn, aposteriorajn aŭ miksitaĵojn. Kiel originon de tiu klasifiko oni ofte mencias superrigardan studon de Couturat kaj Leau de 1903, kelkfoje artikolon de Moch de 1897, pli malofte raporton de la Internacia Lingvistika Societo en Parizo en la jaroj ĉirkaŭ 1858 kaj tre malofte leteron de Kartezio de 1629. Krome, kelkaj sciencistoj opinias, ke la klasifiko kiel distingilon uzas nur la devenon de la vortoj aŭ morfemoj, dum aliaj konsideras la tutan konstruprincipon de la koncerna lingvosistemo. Ĉi tiu esplornoto analizas kaj la originon kaj la kriteriojn de la klasifiko, klopodas taksii ĝian lokon en la pli larĝa tereno de la lingvistiko kaj trovas tre malrapidan procedon de terminiĝo, pro kiu oni eble ne povas klare nomi unusolan aŭtoron de la klasifiko. De ĉi tiu publikaĵo haveblas kompleta Esperanta traduko (Schubert 2018).

Bernhard Tuidler. Die Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek / La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo – fonditaj en 1927 kiel Internacia Esperantomuzeo – fariĝis en sia pli ol naŭdekjara kolekta laboro la plej ampleksa fakbiblioteko por Esperanto kaj interlingvistiko. La instituto ne estas nur biblioteko kaj muzeo, sed ekde la fondiĝo kolektiĝas ankaŭ diversspecaj arkivaĵoj. La artikolo donas mallongan enkondukan superrigardon pri la historio, la havaĵoj kaj celoj de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo. Krome de tio la aktualaj projektoj pri katalogado, ciferecigo (libroj, periodaĵoj, sonbendoj, fotoj, bildpoŝtkartoj, afiŝoj) kaj konservado estas prezentitaj same kiel la permanenta ekspozicio, la eventoj kaj la atelieroj de la Esperantomuzeo.

Kristin Tytgat. Mehrsprachigkeit und Sprachbewusstheit / Plurlingveco kaj konscio pri lingvoj.

Scii fremdlingvojn estas necese por partoprenado en moderna vivo. Oni povas starigi kelkajn demandojn pri la akirado de fremdlingvoj en lernejo, ekz. Kiujn fremdlingvojn niaj infanoj bezonas, kiam kaj kiel oni instruu tiujn fremdlingvojn. »Plurlingvuloj esence estas pli bonaj lernantoj de fremdlingvoj, ĉar ili dum la lernado evoluigis pli altan nivelon de konscio pri lingvoj kaj lingvolernado.« Ĉi tiu artikolo koncernas la demandon, ĉu tio validas ankaŭ por la planlingvo Esperanto. Rilate perceptadon Esperanto proponas klaran lingvomodelon, en kiu la reguleco de la lingvo efektive kondukas al pli alta nivelo de lingvolernada konscio. Plie, planlingvo stimulas ĝeneralan interesiĝon pri lingvolernado. Rilate socion respekto kaj tolero estas gravaj konceptoj por Esperantistoj, kiuj disponas pri altgrada konscio pri lingvoj. Tiuj pozitivaj rezultoj povus plifortigi la intereson pri Esperanto en la ministrejo pri klerigo kaj edukado en Francujo kaj Belgujo.

Louis von Wunsch-Rolshoven. Zum Bild des Esperanto aus der Sicht einiger Sprachwissenschaftler (Über verschiedene unzutreffende Aussagen zu Esperanto und seiner Sprachgemeinschaft) / La bildo de Esperanto el la vidpunkto de kelkaj lingvistoj (Pri diversaj malĝustaj asertoj pri Esperanto kaj ĝia lingvokomunumo)

La artikolo prezentas diversajn malĝustajn asertojn de lingvistoj pri Esperanto kaj speciale pri ĝia lingvo-praktiko kaj lingvo-komunumo; aldone enestas kelkaj ĝustaj prezentoj. La kolektodevenas ĉefe el intervjuoj de lingvistoj, kiuj aperis en amaskomunikiloj, el demandoj al ili en la interreto

kaj el mallongaj mencioj de Esperanto en artikoloj aŭ libroj. Inter la eraroj troviĝas interalie la supozo, ke ne ekzistus Esperanto-lingvokomunumo, ne ekzistus denaskuloj aŭ nur tre malmultaj, ne ekzistus Esperanto-aŭtoroj nek verkoj en Esperanto kaj ankaŭ la ideo, ke ne ekzistus vortludoj en Esperanto (ĉio tio ekzistas). Pro tiuj malĝustaj asertoj, kiuj parte disvastiĝis ankaŭ en la ĝenerala publiko, la vorto »Esperanto« estas komprenata malsame; pro tio la aŭtoro sugestas distingi inter »Esperanto A« (la reale ekzistanta) kaj »Esperanto B« (la sumo de la malĝustajoj). Komunikado bezonas almenaŭ simile difinitajn nociojn; pro tio estas helpe, se oni komence certigas, ke ĉiuj flankoj disponas almenaŭ pri baza scio pri Esperanto kaj ĝia lingvokomunumo.

6. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj

Madella, Alessandra. 2019. 'The Light Cloak of the Saint:' The Changing Rhetorical Situations of Esperanto's "Internal Idea" and its Relevance to Contemporary Problems. *Poroi* 14, Iss. 2 (2019): Article 4. <https://doi.org/10.13008/2151-2957.1278>

Esperanto estis konceptita kiel modelo de komerca utileco, sed ankaŭ por fronti la pli altajn celojn de ĝia "interna ideo". La interna ideo de Esperanto alprenis tra la historio diversajn formojn, sed plej ofte ĝi traktis protektadon de multetna mondo en tie diversecoj, konstruante pontojn kiuj permesas pli egalecan kunbekziston de minoritatoj. Tiu subkuŝa etika emfazo igas la internacian lingvon potenciala levilo por pli justa socio en la nunaj tutmondaj kondiĉoj. Por subteni tiun aserton, mi rekonstruas la retorikan situacion de la eldiroj de Zamenhof pri la "interna ideo" inkluzive de Hilelismo kaj Homaranismo. Mi plue argumentas, ke la distopia lingvo de George Orwell, Newspeak, estas konsiderebla kiel politika komentario pri la sorto de Esperanto se la "interna ideo" estus akaparita nome de ekonomia progreso kaj la supozata trankvilo de komerco.

Rapley, Ian. 2016. Talking to the world: Esperanto and popular internationalism in Prewar Japan. *Japan Society Proceedings* 152: 76-89.

Aray, Başak. 2019. Louis Couturat, modern logic, and the international auxiliary language. *British Journal for the History of Philosophy*, DOI: 10.1080/09608788.2018.1563767. <https://doi.org/10.1080/09608788.2018.1563767>

Traduko de la angalingva resumo:

Certagrade, la renaskiĝo de universalaj lingvoj en la frua 20a jarcento estis la laboro de logikistoj kaj matematikistoj. Pioniroj de moderna logiko kiel Frege, Russell kaj Peano volis superi la diversecon kaj mankojn de naturaj lingvoj. Per la rigoreco de la formala logiko, ili celis provizi al scienca pensado fidindan medion lbera je la ambigueco kaj nekonsekvencaĵoj de ordinara lingvaĵo. Ĉi tiu artikolo montras iujn interkonektojn inter moderna logiko kaj la serĉado de komuna lingvo, kiu unuigos sciencistojn kaj homojn de ĉiuj nacioj. La franca matematikisto kaj filozofo Louis Couturat estas ŝlosila figuro por kompreni la interagadon inter ĉi tiuj du movadoj. Per sia laboro, kiam li kreis la lingvon Ido kiel alternativon al Esperanto, Couturat donis novan vivon al la ideo de Leibniz pri universalaj trajtoj. Krome, lia multflanka laboro provizas valorajn informojn pri iuj politikaj implikaĵoj de frua analiza filozofio.

Marshall, Colin. En la populara retejo [openculture.com](http://www.openculture.com) aperis artikolo de Colin Marshall pri la bilda pasigrafio ISOTYPE de Otto Neurath: "Discover Isotype, the 1920s Attempt to Create a Universal Language with Stylish Icons & Graphic Design". <http://www.openculture.com/2018/12/isotype.html>

Leoni de León, Jorge Antonio. 2018. Diccionario Elemental Español-Esperanto / Esperanto-Español. *Káñina*, Revista de Artes y Letras, Universidad de Costa Rica 42(3): 31-50.

<https://revistas.ucr.ac.cr/index.php/kanina/article/view/35694/36329>

Jorge Antonio Leoni de León klarigas: “La revuo *Káñina* de la Universitato de Kostariko publikigis artikolon, de mia rikolto, pri elementa dulingva vortaro, Hispana-Esperanto / Esperanto-Hispana, kiun mi prezentis dum la VIII Kolokvo pri Kostarika Leksikografio en 2016. *Káñina* estas multlingva revuo pri Arto kaj Beletroj. La Internacia Lingvo estas akceptata.

Lins, Ulrich. En la retejo de la revuo *Esperanto* aperis recenzo de Ulrich Lins por la memorlibro pri Josef Šemer, konata israela esperantisto - https://revuoesperanto.org/memoroj_pri_nobelo

Minnaja, Carlo. La februara numero de la revuo *Esperanto* enhavas ampleksan nekrologon, verkitan de Carl Minnaja, pri Baldur Ragnarsson, kiu mortis la 25-an de decembro 2018. Ragnarsson, eble la plej fama kaj plej multifaceta nuntempa poeto en Esperanto, abunde kontribuis ne nur al la poezio sed ankaŭ al la literatura kritiko. Liaj tradukoj el la islanda helpis disvastigi la famon de la islanda literaturo inter la parolantoj de Esperanto kaj samtempe riĉigis la Esperanto-literaturon mem. Li estis aktiva tra multaj jaroj kiel prezidanto de la Islanda Esperanto-Asocio kaj ankaŭ estis dum iom da tempo estrarano kaj vicprezidanto de UEA, kaj prezidanto de la LKK de la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko en 1977.

7. Disertacioj

Prof. Nina Daniljuk lastatempe informis (nov. 2018), ke kompletigis doktora disertacio pri la Esperanto-movado en Ukrainio: “La disertacio kaj aŭtora referaĵo estas skribita en la ukraina lingvo, sed estas anotacio en la angla fine de la teksto. La aŭtorino Klimentenko Julija Anatolijivna estas profesoro pri historio de pedagogio de Pavlo Tiĉina ŝtata pedagogia universitato. Ĉar ĉe ni oni defendas 2 disertaciojn - unuan por kandidateco kaj duan por doktoreco pri sciencoj, tio estas la dua, kiel PhD. La kvalito estas tre alta. Mi ricevis la monografion, kiu havas la titolon *Disvolviĝo de E-movado en Ukrainio (fino de la XIX - mezo de la 30-aj jaroj de la XX jarcento)* (Uman, 2017, 456 p., aldonitaj dokumentoj p. 329-456). La E-titolo de la disertacio estas *La sociaj kaj pedagogiaj principoj (aŭ bazo) de disvolviĝo de E-movado en Ukrainio (fino de la XIX - mezo de la 30-aj jaroj de la XX jarcento)*, defendita la 26.04.2018 j.”

S. Morales. *The Languages of the Republic: A Republican Theory of Linguistic Justice.* Katholieke Universiteit Leuven. 2018/12. <https://lirias.kuleuven.be/2340435?limo=0>. Jen traduko de la anglalingva resumo:

“Laŭlonge de la historio, la homaro estis socie, ekonomie kaj politike organizita en tre malsamaj manieroj. Ĉiu vojo havas unu komunan eron: kodoj de komunikado por ĉiu estas nemalhavebla elemento de interago. Komunikado estas esence nemalhavebla elemento de iu ajn kolektiva klopodo, de malgranda familio al grandega civilizacio. Ĝenerale, la homa komunikado estas traktata per lingvo. Sekve, lingvo ludas gravan rolon por individuoj kiel lingve enkorpigataj estaĵoj en siaj neeviteblaj rilatoj kun aliaj homoj. Tamen, komunikaj kodoj evoluis en tre malsamaj manieroj kaj pro tre malsamaj kialoj tra la tuta mondo, naskante milojn da malsamaj lingvaj kodoj (aŭ lingvoj). Etikaj kaj politikaj dilemoj ofte fontas el lingva diverseco en teorio kaj praktiko. La kresko de la angla kiel ebla tutmonda *lingua franca*, la granda kresko de enmigradoj kaj rifuĝintoj, kaj la (lingvaj) asertoj de subŝtataj naciaj minoritatoj estis gravaj temoj de la fino de la 20-a jarcento. La respondo al ĉi tiuj aferoj estas la ĉefa celo de kiu ajn filozofo implikita en la tielnomata lingvojusteca debato. Ĉi tiu disertacio rilatas lingve miksitajn sociojn, kie pluraj lingvaj grupoj dividas la saman teritorian spacon kaj loĝas kune en la samaj regionoj, urboj kaj

kvartaloj (ekzemple, la Valencio Lando, Balearaj Insuloj, Katalunio, Eŭskio, Galegio, Aosta-Valo, Kimrio, Bolivio, Bruselo, Kebekio, Papuo-Nov-Gvineo, Latvio, Barato, ktp.). La fundamenta demando, kiun mi intencas respondi, estas: kiuj normaj principoj devus gvidi lingvistikajn sociojn por lingve justaj politikaj komunumoj? Ĝis nun ekzistas tri ĉefaj liberalaj teorioj pri tiaj kazoj: lingva neŭtralismo, lingva naciismo kaj lingva pluraleco. Tamen, neniun donis tute konvinkan teorion pri lingva justeco por lingvistikaj socioj. Ĉi-rilate, ĉi tiu verko estas provo konstrui la ĉefajn fundamentojn de nova kaj pli norme agrabla aliro al lingva politiko: respublika teorio pri lingva justeco.”

8. Novaĵoj pri periodaĵoj

Internacia Pedagogia Revuo (IPR). La ĉefredaktoro Jozefo Nemeth diligente preparas la numerojn de IPR. La revuo strebas koncerni ĉiujn gravajn por ILEI temojn, meti la plej aktualajn informojn pri funkciado de la Ligo kaj pri pedagogio ĝenerale. Intensa kunlaboro okazas inter J. Nemeth kiel redaktoro kaj M. Grosjean en tre serena kaj efika etoso. (M.G.)

Juna Amiko (JA). Poiome daŭras la esploro pri reformigo de la revuo. En la numero 4 por 2018 aperis enketo pri la uzo de JA en instruado de Esperanto. Pri tio delonge diskutis la Estraro de ILEI kaj nun la esploro komenciĝis. La Estraro arde petas ĉiujn kontribui al plua evoluo de nia kara revuo, nia “juvelo” – helpanto en la uzo de Esperanto inter komencantoj kaj ne nur! (M.G.)

Xavi Alcalde informas, ke lastatempe aperis la aktuala numero de **Kataluna Esperantisto**, kies enhavo povas interesi al la legantoj de Ipl/Ifi. La artikoloj estas en la kataluna kun resumo en Esperanto.
<https://www.raco.cat/index.php/KatalunaEsperantisto/issue/view/26824/showToc>

9. ESF-Historio: kunlaborantoj serĉataj

Antaŭ pli ol kvindek jaroj, en 1968, ESF estis fondita kiel eduka kaj esplora neprofitcela fondaĵo. Ekde tiu tempo, ĝi estas grava subvencianto de universitataj esploroj kaj diversaj projektoj rilataj al Esperanto, lingvistiko / interlingvistiko kaj lingva justeco ne nur en Nordameriko, sed en la tuta mondo. La tri fondintoj, junaj tiutempe, daŭre kunlaboras kun ESF kiel konsilantoj aŭ estraranoj.

Tra la jaroj la administrado de la fondaĵo spertis multajn ŝanĝiĝojn. Dumtempe, pluraj dokumentoj estas perditaj aŭ disigitaj, esploristoj kaj estroj de projektoj en pluraj kazoj ne plu vivas, kaj estas klara risko ke valora informo pri la historio de la fondaĵo malaperos se ni ne rapide agos.

Sekve, la estraro pretas financi modestan projekton por konservi la skribitan historion kaj kolekti la memorojn de partoprenantoj en la agadoj de ESF, kiu eble gvidos al la eldono de publikaĵo pri la historio de la unuaj 50 jaroj de ESF. Tial ESF serĉas personon de Usono aŭ Kanado, kiu pretas gvidi aŭ partopreni en tiu ĉi projekto. Se vi interesiĝas, bv. kontakti la Ĉef-Direktoron, Chuck Mays
<chuck.mays@esperantic.org> antaŭ la 30a de aprilo 2019.

10. La Studo-Grupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj invitas vin al Simpozio pri Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Aŭskulti, paroli kaj agadi en multlingva mondo

Ĵaŭdon kaj vendredon, 9-10 majo 2019 ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, USA (Unua Avenuo ĉe 44-a Strato)

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estis subskribita en Sanfrancisko la 26-an de junio, 1945, kaj ekvalidis la 24-an de oktobro tiujare. Sekve, Unuiĝintaj Nacioj festos sian 75-an datrevenon en la jaro 2020. Tra la pasintaj 74 jaroj, Unuiĝintaj Nacioj laboris por (laŭ la vortoj de la Ĉarto) “savi estontajn generaciojn de la plago de milito,” “rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj,” kaj “antaŭenigi socian progreson.”

Mallonge dirite, ĝi kreis kadron de internacia interkonsentado kaj kunlaboro, kiu, kvankam fragila kaj ofte minacata, daŭras jam tri generaciojn. Kion oni povas fari por sekurigi ĝian estontecon? Laŭ Artikolo 1(3) de la Ĉarto, inter la celoj de Unuiĝintaj Nacioj estas “realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

La nuna simpozio dediĉos apartan atenton al la lingva demando. Kvankam UN jam ĉiam favoras dialogon, en lastaj jaroj ĝi fariĝis pli sentema pri la bezono de dialoga egaleco. Alivorte dirite, ĝi fariĝis ĉiam pli sentema pri la neceso aŭskulti siajn publikojn anstataŭ simple paroladi al ili, kaj ne nur kompreni sed ankaŭ esti komprenata. Tiaj konceptoj fundamentas la Celojn por Daŭripova Evoluigo akceptitajn en la jaro 2015 kaj fiksintajn la tagordon de UN dum ĝia alproksimiĝo al sia centjariĝo. En mondo kie oni parolas milojn da lingvoj, ĉu UN pretas por egaleca dialogo, nun kaj estontece? Se ne, kion fari por krei lingvan pretecon – same en la interna funkciado de la organizaĵo kaj en ĝiaj rilatoj kun la pli vasta mondo? Tiuj demandoj estas aparte aktualaj en la jaro 2019, la Internacia Jaro de UN pri Indiĝenaj Lingvoj.

Inter la temoj, kiujn ni esperas konsideri en la simpozio, estas:

- Dialogo en evoluigo
- Lingvopolitiko en UN kaj aliaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj
- Tradukado kaj interpretado (ekz. trejnado de tradukistoj kaj interpretistoj, kunlaboro kun tradukistoj kaj interpretistoj, daŭra profesia evoluigo por konservi lingvokompetenton)
- Multlingvismo en UN kaj internacia kunlaboro
- La rolo de lingvoj en publika diplomatio, ekstera kontaktado kaj alia kampo
- Bezonoj de profesia pretigo por multlingvaj operacioj, inkluzive de evoluigo, packonservado kaj diplomatio
- Lingvoj kaj la tri kolonoj de UN: homaj rajtoj, paco kaj sekureco, kaj evoluigo
- Profesia pretigo por lingva kompetento: konstrui organizan lingvokapablon kiel homan rimedon
- La rolo de la lingvo en negocado
- Unulingvismo kaj la iluzio de interkonsento
- Lingvaj problemoj kaj miskomunikado
- Lingva konscio inter la diversaj instancoj kaj staboj de UN
- Lingvoedukado: pretigi la novan generacion por internaciaj rilatoj
- Indiĝenaj lingvoj kaj la laboro de UN

La fina programo kaj detaloj pri aliĝado troveblas meze de marto 2019 che www.languageandtheun.org.

11. Alvoko pri artikoloj: Speciala numero pri aganteco en lingvoplanado kaj politiko

La revuo *Current Issues in Language Planning* serĉas proponojn pri artikoloj por speciala numero pri “Aganteco en lingva planado kaj politiko”. Limdato por proponoj: 30 junio 2019. Proponojn oni alŝutu al la retejo de la revuo: <https://www.editorialmanager.com/rcpl/default.aspx>.

Informojn pri pretigo de artikoloj por la revuo vi trovos ĉe:

<https://www.tandfonline.com/action/authorSubmission?show=instructions&journalCode=rcpl20>

Aganteco de lingvoplanantoj fariĝis fokuso de lastatempa verkado pri lingvoplanado, precipe en la tereno de mikronivela planado. Ricento (2000, p. 206) argumentas, ke la distinga aspekto de “pli novaj kritikaj/postmodernaj [aliroj] estas aganteco, t.e. la rolo(j) de individuoj kaj kolektivoj en la procedoj de lingvouzo, lingvaj vidpunktoj, kaj, fine, lingvaj politikoj.” Tia fokuso pri aganteco implicas esploradon de la lokoj de akceptiĝo, rezisto, kaj reinterpretado de politiko kaj la rolo de agantoj en interpretado kaj fasonado de eduka politiko je la plej baza nivelo (Hornberger & Johnson, 2007). Tamen, Zhao k Baldauf (2012, p. 5) kritikas la literaturon de lingvoplanado kaj lingvopolitiko pro ties konkretigo de la individuaj kaj grupaj roloj de agantoj “en la ekzamenado de la procedo de politikorealigado” kaj Liddicoat (2019) asertis, ke studoj de agenteco ofte fokusiĝas je la pozitiva flanko sen konsidero de limigoj kaj problemoj. Johnson k Johnson (2015) krome argumentas, ke gravaj demandoj pri potenco havas efikon je la procedo de lingvoplanado kaj lingvopolitiko. Studado de agenteco en lingvopolitiko kaj lingvoplanado sekve ŝajnas malfermi nivelojn de kompliko en nia kompreno de la aganteco de diversaj rolantoj en la procedo. Tiu ĉi speciala numero celas esplori tiujn nivelojn. also argue that there are important issues of power that impact on language planning and policy processes. La numero alvenos la demandon larĝe, celante demandojn kiel la jenajn:

- Kiu posedas agantecon?
- Kiel la aganteco de individuoj kaj grupoj estas realigata?
- Kiel agenteco estas asertata, malakceptita aŭ kontestata?
- Kiuj aspektoj de la kunteksto de lingvoplanado faciligas aŭ limigas agantecon?
- Kiel la aganteca agado de lingvoplanantoj influas la agentecon de aliaj aŭ interagadas kun ĝi?
- Kian efikon havas agantoj je lingvopolitiko kaj lingvoplanado?
- Kion montras empiriaj studoj de lingvoplanado kaj lingvopolitiko rilate la naturon de aganteco?

Hornberger, N. H., & Johnson, D. C. (2007). Slicing the onion ethnographically: Layers and spaces in multilingual language education policy and practice. *TESOL Quarterly*, 44(3), 509-532.

doi:10.2307/40264383

Johnson, D. C., & Johnson, E. J. (2015). Power and agency in language policy appropriation. *14(3)*, 221-243. doi:10.1007/s10993-014-9333-z

Liddicoat, A. J. (2019). Constraints on agency in micro-language policy and planning in schools: A case study of curriculum change. In J. Bouchard & G. P. Glasgow (Eds.), *Agency in language policy and planning: Critical inquiries* (pp. 149-170). New York & London: Routledge.

Ricento, T. (2000). Historical and theoretical perspectives in language policy and planning. *Journal of Sociolinguistics*, 4(2), 196-213. doi:10.1111/1467-9481.00111

Zhao, S., & Baldauf, R. B. (2012). Individual agency in language planning: Chinese script reform as a case study. *Language Problems and Language Planning*, 36(1), 1-24. doi:10.1075/lplp.36.1.01zha

12. Instruista trejnado en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon** kun la kontribuo de Edukado.net, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20.09.2019, la dua 01-07.02.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro.

Informo kaj aliĝo: interlin@amu.edu.pl aŭ ikoutny@amu.edu.pl.

13. Biblioteka apogo Bachrich subvencias 15 bibliotekojn

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj, asignis subvenciojn - uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA - al 15 bibliotekoj okaze de la jara alvoko de 2018, pozitive konsiderante ĉiujn petojn ricevitajn en la pasinta jaro. El tiuj 15 petoj, 2 povis esti tute plenumitaj kaj la aliaj 13 estis parte plenumitaj.

La subvencioj de 2018 estis: **Flandra Esperanto-Ligo**, Belgio -- € 112,02; **Centre d'Orphelinat La Providence**, Benino -- € 91,75; **Esperanto-Klubo Kariri**, Brazilo -- € 110,50; **Biblioteko Jerônimo dos Santos** (Potigvara Esperanto-Asocio), Brazilo -- € 108,75; **Biblioteko Carlos Domingues** (Brazilo Esperanto-Ligo), Brazilo -- € 111,05; **Pernambuka Esperanto-Asocio**, Brazilo -- € 108,25; **Esplora Societo Auta de Souza**, Brazilo -- € 82,00; **Esperanto-Muzeo en Svytavý** (Ĉeĥa Esperanto-Asocio), Ĉeĥio -- € 107,20; **Esperanto-Kulturdomo Kastelo Greziljono**, Francio -- € 107,78; **Espoteko** (Berlina Esperanto-Ligo, Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio), Germanio -- € 106,32; **Interkultura Centro Herzberg**, Germanio -- € 103,87; **Biblioteko-Arĥi vo Petro Nuez** (Kataluna Esperanto-Asocio), Hispanio -- € 109,60; **Triesta Esperanto-Asocio**, Italio -- € 106,42; **Moskva Esperanto-Biblioteko**, Rusio -- € 111,00; kaj **Klubo Verda Stelano**, Ugando -- € 142,95.

UEA ricevis por 2018 konsiderindan kvanton da tre kvalitaj subvencioj el Eŭropo, Afriko (Benino kaj Ugando) kaj Ameriko (Brazilo), kun signifa kresko de la nombro da petoj el Brazilo. La komisiono, kiu pritraktis la petojn, konsideris plenumon, eĉ se parta, por ĉiuj. La Regularon por la Biblioteka Apogo Bachrich oni trovas ĉe: https://uea.org/teko/regularoj/regularo_biblioteka_apogo.

La Biblioteka Apogo Bachrich -- starigita de UEA en 2014 danke al la malavara donaco de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich (Venezuelo) -- alfrontas unu el la plej sentebaj kulturaj bezonoj de la Esperanto-movado, subtenante Esperanto-bibliotekojn ne ricevantajn financan subtenon de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco, kaj kiuj tial riskus ne havi sufiĉe da rimedoj por adekvate pligrandigi siajn kolektojn. UEA laboradas por krei pli kaj pli da similaj ebloj por plifortigi la Esperanto-kulturon kaj kuraĝigas al pliaj tiukampaj iniciatoj. Donacoj tiucelaj estas tre bonvenaj por Fondaĵoj Afriko, Ameriko kaj Kultura Evoluigo. Kiel donaci oni trovas ĉe: <https://uea.org/alighoj/donacoj>.

14. Esperantologia Konferenco 2019

La organizantoj de la Esperantologia Konferenco 2019 okazonta en Lahtio, Finnlando, kadre de la 104a Universala Kongreso de Esperanto alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj ĝeneralan kongresontojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco.2019, sub la aŭspicio de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La ĉi-jara aranĝo pritraktos du specialajn temojn:

1. la interlingvistikan aliron al piĝinoj kaj kreoloj, fenomenoj ĉiam interesaj al Esperantologoj. La temon proponis d-ro Bengt-Arne Wickström.
2. la indiĝenajn lingvojn: nuntempo kaj estonteco, okaze de la deklaro de Unuiĝintaj Nacioj por 2019: Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj.

La konferenco okazos en du partoj. Dum la matena sesio ni aŭskultos prelegojn de fakuloj pri la konferencaj specialaj temoj. En la dua duono, la partoprenantoj denove havos la ŝancon prezenti siajn laborojn pri plej diversaj kampoj de Esperantologio. La kontribuoj de tiu parto povos esti prezentitaj ĉu buŝe, ĉu per afiŝo.

Ni invitas ĉiujn fakulojn, aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn, sendi proponojn, speciale pri afiŝoj, kiel eble plej baldaŭ al ek@kulturo.net. La limdato por la proponoj estos 2019-04-30.

15. Staatsbibliothek zu Berlin

La 15-an dec. ĉi-jare la Staatsbibliothek zu Berlin (Haus Potsdamer StraÙe) festis sian malfermon antaŭ 40 jaroj (en 1978) en tiama Okcident-Berlino. Preskaŭ ekde tiam en ĝi troviĝas pli kaj pli da Esperanto-literaturo, kaj la UEA-organo *Revuo Esperanto*. Ĉi-jare la (ge)redaktoroj de la revuo donacis por la biblioteko pliajn de en ilia eldonejo “impeto” eldonitaj libroj.

Ankaŭ la “Esperanto-Libraro”, filio de Podlaha Biblioteko en Bjalistoko donacis pliajn E-librojn, intertempe registritaj en la OPAC-katalogo de Stabi Berlin kaj jam pruntepreneblaj. Fakte la nomon Staatsbibliothek zu Berlin – Preussischer Kulturbesitz, (SBB-PKB) la Fondaĵo Prusa Kulturposedajxo donis en la jaro 1992 ankaŭ al la Deutsche Staatsbibliothek (iama Preussische Staatsbibliothek) en Orient-Berlino, Unter den Linden, okaze de kunigo de ambaŭ bibliotekoj en Berlin.

La malnova biblioteko ĉe Unter den Linden ricevis la historian nomon Preussische Staatsbibliothek okaze de renovigo, legebla surmure en la ĉefenirejo, apud la nuna nomo oficiala. En ambaŭ bibliotekoj troviĝas ofte la samaj libroj, kiel ekz. E-vortaroj, por konsulti surloke, sen bezono vagadi inter ambaŭ bibliotekoj. En la parto de BSB por infanoj en Westhafen troviĝas pliaj E-libroj por infanoj.

16. UMEA: Medicinaj disertacioj en Esperanto?

Universala Medicinista Esperanto-Asocio UMEA lastatempe anoncis, ke nun “eblas verki medicinan aŭ farmacian disertacion en Esperanto kadre de la UMEA, kiu tiucele kunlaboras kun la Jagielona

Universitato en Krakovo, Pollando. Se vi estas kvalifikita kaj pripensas fari ĝin, aŭ konas interesitajn gestudentojn el la medicinaj aŭ farmaciaj fakultatoj en viaj landoj, bv. peti ilin kontakti umea@interlia.pl.”

17. Konferenco: Multdisciplinaj Aliroj al Lingvopolitiko kaj Lingvoplanado

La Konferenco Multdisciplinaj Aliroj al Lingvopolitiko kaj Lingvoplanado okazos de 22 al 24 aŭgusto, 2019, ĉe OISE, Universitato de Toronto.

Aldone al sesioj prezentitaj de esplorantoj kaj praktikantoj, la konferenco prezentos ĉefparoladojn de:

- **Lindsay Keegitah Borrows** (Indigenous Law Research Unit, University of Victoria), aŭtoro de *Otter's Journey Through Indigenous Language and Law*
- **Angel Lin** (Simon Fraser University), aŭtoro de *Language Across the Curriculum & CLIL in EAL Contexts*; kaj
- **Jonathan Rosa** (Stanford University), aŭtoro de *Looking Like a Language, Sounding Like a Race: Raciolinguistic Ideologies and the Learning of Latinidad*.

Por aliĝi kaj por aliaj detaloj, vizitu: <https://wordpress.oise.utoronto.ca/lpp-conference/>

18. Misasertoj pri Esperanto

Komunikas Lu Wunsch-Rolshoven (lu.esperanto@gmx.de):

Dum la lastaj jaroj mi pli kaj pli konstatis, kiom da malveraj asertoj rondiras pri Esperanto. Konstateblis ke eĉ lingvistoj malvere informas (fakte kutime sen konscii pri la malvereco). Mi esploris tion kaj fine verkis unuan artikolon pri tio, germanlingve en la jarlibro de la societo pri interlingvistiko,

<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2018/JGI2018-Wunsch.pdf>

Zum Bild des Esperanto aus der Sicht einiger Sprachwissenschaftler. Über verschiedene unzutreffende Aussagen zu Esperanto und seiner Sprachgemeinschaft

(Pri la bildo de Esperanto el la rigardo de kelkaj lingvistoj. Pri diversaj malĝustaj asertoj pri Esperanto kaj ties lingvokomunumo)

Mi planas tradukojn al Esperanto kaj la angla, eble aliaj lingvoj.

Ni ĉiuj scias, ke Esperanto havas denaskulojn, ke ekzistas lingvokomunumo, literaturo, aŭtoroj, vortludoj, vivanta kulturo, lingvoŝanĝiĝo, ke la lingvo ankaŭ por azianoj estas multe pli rapide lernebla ol ekzemple la franca - kaj ke kiel konsekvenco el la faktoj Esperanto hodiaŭ estas vivanta lingvo kreiginta kaj kreskinta dum jarcento. Tamen mi trovis por ĉio ĉi la malajn asertojn el la plumo kaj buŝo de geprofesoroj de lingvistiko. Estas iom ŝoke por mi, mi konstatas.

Sekve ŝajnas al mi, ke unu el la nunaj prioritatoj de la Esperanto-agado estas informi lingvistojn kaj lingvistarojn pri la reala stato de Esperantujo - por almenaŭ provi redukti la daŭran fluon de misinformoj pri Esperanto el ilia rondo.

Nova informilo pri Esperanto, ĉefe por lingvistoj kaj studentoj

Por ne nur resti ĉe la plendado mi okaze de konferenco pri multlingveco en Berlino kreis tekston kaj informilon, kiu prezentas la faktojn, precipe ĝuste tiujn, kiuj montras, ke la plej multaj el la supre nomitaj kredoj kaj misasertoj malĝustas. Multaj homoj donis sian tempon por la tradukado, reviziado kaj grafiko - tre aŭfable organize helpadis ĉefe Renato Corsetti.

Mi dismetis kaj disdonis la informilojn en kvar lingvoj dum la konferenco - eble dekon mi sukcesis enmanigi, alian tridekon homoj prenis (sufiĉe kontentige en konferenco de eble okdek homoj). Jen la informiloj troviĝas rete en la kvar lingvoj itala, franca, angla kaj germana:

<http://www.esperantoland.org/dosieroj/it1.pdf>
<http://www.esperantoland.org/dosieroj/it.pdf>

<http://www.esperantoland.org/dosieroj/fr1.pdf>
<http://www.esperantoland.org/dosieroj/fr.pdf>

<http://www.esperantoland.org/dosieroj/en1.pdf>
<http://www.esperantoland.org/dosieroj/en.pdf>

<http://www.esperantoland.org/dosieroj/de1.pdf>
<http://www.esperantoland.org/dosieroj/de.pdf>

Kiel disvastigi la informilon

En Berlino kun kelkaj homoj mi ĵus interkonsentis, ke ni volas zorgi pri dismetado de tiuj informiloj en la universitataj lingvo-institutoj por atingi, ke ni iusence vakcinas la studentojn kontraŭ profesoraj misinformoj pri Esperanto. Presi milon da ili kostas proks. 50 eŭrojn. Disdoni ilin en unu universitato kun eble kvino aŭ deko da lingvo-institutoj daŭras eble unu aŭ du horojn. Supozeble unu tago sufiĉos por fari tion en la tri diversaj universitatoj de Berlino, eble aldone en kelkaj altlernejoj. Dungi studenton por tio kostos malpli ol cent eŭrojn. Sume unufoja disdonado kostos sub 150 eŭroj (aldone iom da organizado); daŭris kelkajn sekundojn por havi la necesajn donacopromesojn.

Se bone funkcios, eblos konsideri fari la samon en aliaj universitataj urboj. Eble troviĝos pliaj donacemuloj.

Kie kolekti misajn asertojn pri Esperanto?

Plu funkcias

Eraroj kaj mitoj pri Esperanto

https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto#Eraroj_kaj_mitoj_pri_Esperanto

kaj

Stop talking down Esperanto, en Facebook

<https://www.facebook.com/groups/250353055389540/>

19. Afriko en mondo de lingvoj

En Hispanio, la Universitato de Seviljo (Universidad de Sevilla → Unibersidad' de Sebiĝa) institucie kaj iom mone subtenas la projekton "Afriko en mondo de lingvoj", kiu stariĝos inter januaro kaj majo de 2019.

La temo havas kvar branĉojn. La unua estas la produktado de kvin videoj, ĉiu el ili pri la lingva afero en konkreta Afrika lando, specife pri la realo de la lokaj lingvoj, la kolonia (kutime la franca) kaj la mondhegemonia (la angla). Ĉiu video estas respondeco de loka esperantisto, kiu registros ĝin Esperante.

La dua estas la aranĝo de seminario en la Universitato de Seviljo, al kiu estos invitataj la universitatanoj kaj la civitanoj el la urbo. Ĉiu sesio same aranĝiĝos: enkonduko de la ĝenerala temo pri lingva justeco kaj la specifa situacio en Afriko; spektado de la video kaj fina skajpa babilado kun la landa respondeculo. La lingvo de la babilado estos Esperanto, kun samtempa tradukado.

La tria branĉo estas la traduko de la videaro minimume al la hispana kaj ĝia senpaga reta disvastiĝo.

Kaj la kvara temas pri la verko kaj publikigo de libro, kiu ne nur enhavos kvin specifajn ĉapitrojn, sed ankaŭ aliajn far spertuloj. El Afriko partoprenas Adjévi Adjé (Togolando), Bernard Gnancadja (Benino), Byelongo Elisée (Sud-Afriko), Drissa Flayoro (Maliao) kaj Joel Muhire (D.R. Kongo). El Hispanio partoprenas kelkaj fakuloj pri filologio kaj antropologio.

Respondecas Vicente Manzano-Arrondo (Viko). Se vi deziras scii pli aŭ iel partopreni, bonvolu skribi al viko@us.es.

20. Esperanto-kurso ĉe Universitato Allame Tabataba'i, Irano

Raportas Ahmadreza Mamduhi, ĉefdelegito de UEA, kaj sekciestro de ILEI en Irano:

En decembro finiĝis la kvara kurso de Esperanto ĉe Universitato Allame Tabataba'i. Temas pri Lingvo-instrua Centro de Allame, kie ĉ. dek fremdaj lingvoj estas instruataj kaj por la studentoj kaj por la publiko. La kursoj, konsistas el 12 sesioj, kaj ĉiu sesio estas 2-hora.

Okaze de la ĉi-jara Tago de Esperanto kaj Zamenhof, inaŭguriĝis Esperanto-klubo de Universitato Allame Tabataba'i, kion konsistigas kaj fizika oficejeto en la Universitato kaj virtuala klubo en Telegram. Al la Telegrama kanalo de la Klubo ĝis nun aliĝis 106 personoj. Tie jam prezentiĝis Esperanto, Zamenhof, opinioj kaj diraĵoj de mondaj fame konataj figuroj pri nia lingvo, kiel Gandhi, Umberto Eco, Mario Pei, ...; propedeŭtika rolo de E-o, Pasporta Servo, fakdelegitoj de UEA kiel rimedo por plenumado de internaciaj akademias esploradoj,...

Rilata al la propedeŭtika valoro de Esperanto jam en la kanalo aperis informo pri nova metodo por lernigi diversajn lingvojn post kelkmonata kursaro de Esperanto.

21. Esperanto en konferenco de Lingva Societo de Barato

La 40a Internacia Konferenco de la Lingva Societo de Barato (ICOLSI-40) okazis en la Centra Instituto de Barataj Lingvoj (CIIL), Majsuro, en decembro 2018. La organizintoj invitis A. Giridhar Rao (Universitato Azim Premji, Bengaluro) proponi sesion pri Esperanto. Ekde frua 2017, D-ro Rao jam prezentis plurfoje Esperanton en labortendaroj de la Nacia Traduka Misio ĉe la gastiganta instituto, CIIL.

La sesio en ICOLSI-40 estis titolita "Esperanto-Ekspreso: Lingvo, Komunumo, Kulturo". Ĉeestis ĝin ĉirkaŭ 40 profesiaj lingvistoj, preskaŭ ĉiuj de diversaj universitatoj en Barato. La plimulto neniam aŭdis pri

Esperanto, kaj la kelkaj kiuj ja aŭdis pri ĝi, sciis apenaŭ ion krom la etikedo “artefarita lingvo”. Dum la posta horo, la sesio eksprese traktis la historion de Esperanto, ĝian fonologion kaj morfologion (aparte la fekundecon de ĝiaj afiksoj), la diversecon de la komunumo, kelkajn ekzemplojn de ĝia kultura vigleco, kaj superrigardon de ĝia ideologio (la Praga Manifesto, ekzemple).

Dum la tuthora, vigla diskutado kiu sekvis, pluraj el la demandoj estis kompreneble pri lingvaj ŝanĝiĝo kaj variaĵo, dialektiĝo, terminologio, kaj kuntekstoj de lingvouzado. La ĉeestantoj miris kiugrade Esperanto estas tute normala lingvo, kaj samtempe io nova kaj aparta. Pluraj partoprenintoj deklaris, ke ili esploras la aferon plu. (Fotoj kaj informoj: <http://www.ipernity.com/blog/giridhar/4714720>)

22. Esplorprojekto pri la frua Esperanto-movado en Eŭropo

‘Esperoplena’ lingvo en ‘amika loko’: rolantoj kaj retoj de Esperanto en Okcidenta Eŭropo (proks. 1880-1920) estas esplorprojekto nuntempe farata de doktora kandidato Jordan Girardin, de la Universitato de St. Andrews, Skotlando, kun parta subteno de ESF: <http://www.jordangirardin.com/books.html>. La ĉefa financado venas pere de postdoktora esplora subvencio Leibniz, La projekto esploras retojn de esperantistoj en la frua dudeka jarcento en Eŭropo kaj esploras kiel Esperanto estis uzata kiel socikultura ligilo trans naciaj limoj.

23. Konferenca partopreno

Makao. La 1-an de novembro 2018, doktorino Alessandra Madella nome de UEA ĉeestis la 2-an Konferencon pri Taksado de Mondaj Lingvoj en la Universitato de Makao. Ŝi estas itala instruistino dungita de la Artkolegio Kunming Ĉinio. La prezentado pridiskutis la formalan kaj ne-formalan taksadon en la kursoj de Esperanto de la Artkolegio de Kunming kompare kun la KER-ekzamenoj. Krome, mencio estis farita de la *Unesko-Kuriero*, la Kursoj de *Unesko-Kuriero* gviditaj de Dennis Keefe en Koreio kaj Francio, la Konkurso Teo kaj Amo, Esperanto-instruado ĉe la baz-lernejo Baiyangshujie kaj la Universitato de Zaozhuang. Oni faris al ŝi multajn demandojn kaj homoj estis ege interesitaj. Multaj miris, ke Esperanto estas uzata fare de la revuo de Unesko. Ŝia ĉeesto ricevis subvencion de ESF.

Rusio. Raportas Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, “Hodiaŭ (9 novembro 2018) ni partoprenis en la 9-a Tutrusia scienc-praktika konferenco “Amasaj komunikiloj en multpolusa mondo: problemoj kaj perspektivoj”, kiu okazis en Moskvo, Rusio. Tie ni prelegis pri ‘Literatura recenzado en la revuo *Esperanto*’ (Anna), kaj ‘*Unesko-Kuriero* en Esperanto’ (Dima). Fine de novembro ambaŭ niaj prelegoj aperos paperforme en la libro de la konferenco.”

24. Nova redaktoro ĉe LPLP

La eldonejo John Benjamins kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĝojas anonci, ke ekde volume 43:1 (2019), François Grin (Universitato de Ĝenevo) transprenos de Timothy Reagan la ĉefredaktorecon de la revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado). Ankaŭ nomiĝis nova redaktoro, Michele Gazzola (Ulster University), kaj recenza redaktoro, Lisa McEntee-Atalianis (Birkbeck, Universitato de Londono), kaj redakcia komitato (<https://www.benjamins.com/catalog/lplp>).

Language Problems and Language Planning (LPLP) estas fakule recenzata internacia kaj multlingva revuo dediĉita al la studado de multlingvismo kaj lingvopolitiko. Ĝi havas apartan intereson pri kontribuoj pri relative grandskalaj lingvaj demandoj kaj iliaj internaciaj implicoj. LPLP instigas interdisciplinecon en la studado de multlingvismo kaj lingvopolitiko. Kontribuoj de iu ajn el la lingvaj disciplinoj, kaj ankaŭ de aliaj kampoj en la sociaj sciencoj (inkluzive de politika scienco, sociologio, ekonomiko, edukada scienco, psikologio, filozofio, historio, juro, ktp) estas bonvenaj, kun prioritato por studoj proponantaj fortan analizan orientiĝon (ĉu teoria, empiria, metodika aŭ kombinaĵo de ĉi tiuj ecoj). Pli detala Redaktora Prezento de la nova ĉefredaktoro estas disponebla enrete:

https://benjamins.com/series/lplp/Grin_Editorial.pdf .

25. Universitato de Vieno ricevis la paperojn de Eugen Wüster

Depost 1997, la postlasaĵo de la internacie konata interlingvisto kaj fondinto de terminologia scienco Eugen Wüster (1898-1977) troviĝis prunte ĉe la Instituto por Filozofio de Scienco kaj Esploroj en la Universitato de Vieno. Austrian Standards International, ĝia posedanto, nun oficiale donacis la postlasaĵon al la Universitato de Vieno. <http://www.univie.ac.at/voeb/blog/?p=47925>

26. Esperanto en universitatoj

Kostariko. D-ro Jorge Antonio Leoni de León, direktoro de la Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de la Universitato de Kostariko informas, ke en la lastatempa Esperanto-kurso de la Fakaro pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo de la Universitato de Kostariko partoprenis 30 plurfakaj studentoj el kiuj 26 sukcesis la kurson. Estas intereso por ke en la dua semestro de 2019 oni proponu sekvon de tiu kurso.

Ukrainio. La 14-an de decembro 2018 en Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato (u. Lucjk) okazis malfermita leciono “Internaciaj lingvoj. Esperanto” de profesoro Nina Daniljuk, dediĉita al la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof. Ĝi estis leciono de la ordinara kurso “Enkonduko al lingvistiko” por la studentoj de fakoj “ukraina lingvo kaj literaturo”, “pola lingvo kaj literaturo” (filologia fakultato kaj ĵurnalistiko) kaj samtempe leciono de la speciala kurso “Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko” por la studentoj de fakoj “angla lingvo”, “franca lingvo”, “aplikata lingvistiko” (fakultato de eksterlanda filologio). La partoprenintoj spektis retan prezentaĵon pri etnaj kaj artefaritaj lingvoj, kiuj rolis kiel internaciaj en diversaj tempoj kaj diversaj mondopartoj. Ili eksciis pri fondigo de Esperanto kaj E-movado, pri E-organizaĵoj, pri E-periodaĵo kaj literaturo, pri adeptoĵoj de Esperanto en Ukrainio kaj esperantologio kiel parto de scienco interlingvistiko.

Ukrainio. La 13–14-an de novembro 2018 en la Esperanto-centro de Lesja Ukrainka Orienteŭropa nacia universitato (u. Lucjk) okazis scienc-praktika ronda tablo “Planlingvoj en la historia aspekto. Esperanto”. Ĝin partoprenis 18 magistrantoj de fakultato pri eksterlanda filologio, kiuj elektis la kurson “Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko” de prof. Daniljuk.

Rusio. La 22-an de decembro okazis la 3-a Moskva Esperanto-renkontiĝo de Lernantoj (MERL). MERL celas komencantaj kaj progresantaj studentojn de la diversnivela Esperanto-kursoj, kiuj okazas en la Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj (RUDN) ekde 2014, kaj ne nur. Ĉi-foje speciala gasto de la aranĝo estis Fransoazo Oazo el Francio, kiu ludigis, kantigis, dancigis la homojn kaj faris grandan prezenton de regionoj de Francio, montrante kaj komentante videojn.

Ĉinio. La 15-an de septembro estis oficiale fondita la Esperanto-Asocio en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Tio ŝuldiĝas al profesoro Li Weilun kaj liaj lernantoj. La 12-an de oktobro, Li kaj la lernantoj de la asocio unuafoje varbadis membrojn en la universitato. Dum la varbado, multaj ĉinaj kaj fremdlandaj studentoj ekkonis kaj interesiĝis pri Esperanto. 39 personoj fariĝis novaj membroj de la asocio kaj aliĝis al Esperanto-kursoj gvidataj de profesoro Li.

Filipinoj. Komunikas Albert Stalin Garrido albertstgarrido@gmail.com: "La dua elsendo de la podkasto kreaĵoj de la Esperanto-Societo de la Universitato de Filipinoj (alinome "UP Esperanto-Societo") estis publikigita lundon, la 21an de januaro. Ankaŭ ĉi tiu elsendo estas speciala kun pli buntaj enhavoj: niaj ĉeftemoj estas Kristnasko, la novjara festado, kaj la mortdatreveno de la nacia heroo d-ro Jose Rizal. Ni oferis poemon laŭtlegitan kaj kantojn, kiujn ni mem tradukis kaj kantis. Vidu: <https://soundcloud.com/up-esperas/up-esperas-podkasto-02>. La podkasto de UP Esperanto-Societo estas la unuaj iniciatoj de podkasto en la historio de la filipina Esperanto-movado: temas pri podkasto kun originalaj enhavoj prilaborataj de filipinaj studentoj. La antaŭmikrofonaj gvidantoj estis Anne Frances Calceta, Direktorino pri Informado, kaj Carl Dizon, Direktoro pri Edukado de UP Esperanto-Societo. Kunreĝisoras kaj lingve kontrolas Albert Stalin Garrido, prezidanto."

Japanio. Kursoj de Esperanto ĉe Tokia Universitato de Fremdaj Studoj: la "Malfermita Akademio" de la Tokia Universitato de Fremdaj Studoj komencis varbi gestudentojn por malsam-nivelaj kursoj de 38 mondaj lingvoj por la printempa semestro kiu komenciĝos ekde aprilo. Oni estas ankaŭ varbanta gestudentojn por la du kursoj de Esperanto (elementa kaj elementa mez-nivela) en la kampuso de la universitato Aoyama Gakuin. <https://tufsoa.jp/>

27. Memorfestoj ĉe ĉina Esperanto-muzeo

En la 1a ĝis la 2a de decembro la memorfesta aktiveco por la 5a datreveno de la Esperanto-Muzeo okazis en la Kolegio Zaozhuang en la provinco Shangdong. Pli ol 200 homoj, esperantistoj ĉinaj kaj eksterlandaj, inkluzive de amaskomunikistoj, instruistoj kaj studentoj el Kolegio Zaozhuang, kune ĉeestis la memorfestan aktivecon.

Ekde la stariĝo de la muzeo pli ol 20 asocioj kaj pli ol 100 homoj donacis pli ol 40.000 objektojn. En la pasintaj kvin jaroj la muzeo akceptis 42.000 vizitantojn el pli ol 20 landoj kaj regionoj. Pli ol 1,8 milionoj da homoj vizitis la retejon de la muzeo. En ĉi tiu jaro, la kolegio varbis al si unuajn studentojn por Esperanto, kaj kelkaj doktoroj el Japanio, Koreio kaj Pollando estis dungitaj kiel instruistoj.

Por tiu ĉi memorfesta aktiveco oni ricevis 39 gratulajn mesaĝojn de 15 asocioj kaj esperantistoj el la tuta mondo, inkluzive de Universala Esperanto-Asocio kaj Ĉina Esperanto-Ligo. Mark Fettes, ĝenerala direktoro de Universala Esperanto-Asocio, notis la gravan kontribuon de Kolegio Zaozhang pri la protekto kaj disvastigo de Esperanto. Li indikas en sia mesaĝo, ke la Esperanto-Muzeo portas la konfidon kaj esperon de esperantistoj el la tuta mondo.

28. ILEI 70-jara

En 2019 la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj fariĝas 70jara. Okaze de tiu jubileo la Ligo akceptas kaj bonvenigas iujn ajn ideojn pri instruado de Esperanto, pri la Ligo mem, pri ĝia festo, ĝia evoluo, ĝia kresko ktp. Estis kreita emblemo de la jubilea jaro kaj proponita plano de celebraj eventoj. La Estraro

esploras diversajn informfontojn pri la historio kaj agado de la Ligo. Estas serĉata kunordiganto por la tuta evento. La Estraro planas kreadon de filmo, dediĉita al agado de ILEI kaj ĝia jubileo.

29. Komisiono pri Universitata Agado formiĝis

Raportas Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI: “La Nitobe-simpozio okazinta en Lisbono la 4-an kaj 5-an de aŭgusto estis momento, kiam kvindeko da fakuloj priskribis la situacion de la apero de Esperanto en universitatoj kaj skizis la bezonojn. Tuj vidiĝis, ke la Komisiono de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) situas en centra loko de tia agado kaj povas ludi gravan rolon. Esperantic Studies Foundation (ESF) kontribuas nun al la aktivigo de la Universitata komisiono de ILEI kaj komisiis al Angela Tellier instigi la laboron. En oktobro 2018 ekfunkciis laborgrupo konsistanta el Angela Tellier flanke de ESF kaj el membroj de la Universitata Komisiono de ILEI: Renato Corsetti (Italio/Britio), Vicente Manzano-Arrondo (Hispanio) kaj ILEI-estrarano Radojica Petrović (Serbio). Al ĝi poste aliĝis Elisée Byelongo (Sud-Afriko) kaj Kimura Goro Christoph (Japanio).”

30. 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio

Funkcias reta aliĝilo por la kongreso <https://goo.gl/forms/TOrY5bltJtK0BKeG2>. Novaĵoj estas omunikataj tra la fejsbuka grupo ILEI-kongresoj, kaj aliaj komunikkanaloj. Aliĝis la unuaj partoprenantoj el Bulgario, Svislando, Francio, Serbio kaj Ĉinio. En la ĝisnunaj preparoj estas difinitaj du ĉefaj aksoj de la kongresa programo:

1. Solenado de la 70-a datreveno de ILEI,
2. Traktado de la kongresa ĉeftemo “Lernado en virtualaj komunumoj” en kunteksto de la *Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj 2019* proklamita de UN (subtemoj: Virtualaj lernkomunumoj de indiĝenaj lingvoj, Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio).

La estrarano pri kongresoj kaj LKK interkonsentis kun la estraro de la kongresurba Fakultato de Teknikaj Sciencoj, gastigonto de la kongreso, ke enkadre de la kongreso okazu trilingva (Esperanto, la serba, la angla) internacia konferenco pri la kongresa temo kun la Fakultato kaj ILEI kiel kunorganizantoj. Tio ebligis, ke:

- La *Edukministerio de Serbio* povos agnoski la konferencon en sia registro de internaciaj konferencoj donantaj al siaj partoprenantoj certajn poentojn por avanco en la universitata kariero.
- La *Serbia Instituto pri Progresigo de Edukado* povos rekoni ĝin kiel seminarion por mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj, kiuj bezonas partoprenon en fakaj seminarioj por pluvalidigo de la instruista licenco.

31. Kongreso de Esperanto ĉe Shenyang-universitato

La 5-an de januaro 2019 okazis la 11-a Liaoning-Kongreso de Esperanto en la Instituto de Fremdlandaj Lingvoj de Shenyang-Universitato, Ĉinio. Samtempe okazis fondiĝo de t.n. Esplora Bazo de Esperanto. Ilin ĉeestis pli ol 60 esperantistoj el la provinco. Oni elektis Profesorinon Wang Yan kiel novan prezidanton de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA). Docento Pan Chengbo, konstanta vic-ĝenerala sekretario prezidis.

La instituto, kiun prezidas Prof. D-rino Wang Yan, fondiĝis en 1980 kaj establis multajn fakojn, inkluzive de fakultato de angla lingvo, fakultato de japana lingvo, fakultato de rusa lingvo, Instituto de Ĉina kaj Okcidenta Kulturo kaj Eduko ktp. Ĝi havas longan kaj amikecan kunlaboron kun multaj universitatoj en Britio, Japanio, Rusio kaj Usono. En la jaro 2006 ĝi enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton

kaj tiam kreis en la mondo Esperanto-instruan kordon, tiel ke pli ol 600 studentoj partoprenis en la kursoj. Aktivis Esperanto-organizo de studentoj, nome Esperanto-societo de Shenyang Universitato.

En la kongreso s-ino Jiao Xiyang voĉlegis gratulajn leterojn kaj s-ro Wu Guojiang faris raporton pri Esperanto en kvardek-jara reformo kaj pordomalfermo de Ĉinio por Liaoning. S-ro Liu Enwei prezentis biografieton de D-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto. S-ro Liu Zhengkun resumis la laborojn de LEA en la pasintaj laboroj.

Prof. D-rino Wang Yan faris bonvenajn vortojn kaj donis al la estonta laboro de la asocio kvin konsiderojn. La unua estas **konstruado de organizo**. Ĝi emfazas (re)fondon kaj evoluon de Esperanto-asocioj en urboj krom la interna konstruado de la provinca asocio mem. La dua estas **skala evoluo**. Ĝi klare intencas altiri amason da instruistoj kaj studentoj al la asocio por multigi membrojn; espereble ili fariĝos la ĉefa forto por progresigi la asocion. La tria estas **enhavo-vastigo**, kiu celas ne nur disvastigon kaj semadon de Esperanto, sed enhavon de aliaj naciaj lingvoj kiel ĉina, angla, japana, rusa, germana, franca, korea ktp. por diferenco, kunfandiĝo kaj kunekzisto de la mondaj lingvoj. Sekvas **disvastigo de Esperanto**, kiu substrekta konstruadon de Esperanto-platformo per establo de ĝeneralaj Esperanto-kursoj en altlernejoj kaj per funkciigo de Esperanto-kursoj en komunumoj kaj lernejoj, kaj esploron kaj produktadon de mikro-kurso de Esperanto sur reta video. La lasta rilatas al **akademiaj esploroj**. La asocio sufiĉe utiligos la du platformojn Esplora Centro Liaoning pri Eduko kaj Kulturo de Esperanto en la Orienta Liaoning Universitato kaj Esplora Bazo Liaoning de Esperanto en Shenyang-Universitato, profunde studos akademian demandojn pri Esperanto, kaj kreas multajn ŝancojn de akademian interŝanĝoj por altigi la nivelon de produktado, eduko kaj esploro.

32. Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de Internacia Patrinlingva Tago, 21 februaro 2019

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo, plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo la bangla, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo “pli granda”, parolata de la fortuloj de la momento.



Universala Esperanto-Asocio

Temas pri tio, kio ripetiga, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ekzemple rilate al la indiĝenaj lingvoj, sed ankaŭ rilate al aliaj “malfortaj” aŭ minoritataj lingvoj, kiuj rezulte ne aŭdiĝas en lernejoj, ne aperas en oficialaj rondoj, ne estas partoj de la publika vivo, kaj perdas sian rekonon kaj prestiĝon.

Tiel okazas iom post iom la malapero, morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian intelektan riĉecon – kiel pri tio rimarkigis multaj lingvistoj, kaj en 2019 aparte atentigas UN kaj Unesko.

Krom la socia maljusteco kaj psikologiaj problemoj rezultantaj el la perdo de uzeblo de sia gepatra lingvo, kaj pro nesufiĉa sperto en la uzo de la altrudata lingvo, necesas konscii ankaŭ pri aliaj realaĵoj: la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj necesaj ekzemple por daŭripova biodiverseco kaj por kultura kontinueco.

En la jaro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la ĉiujara *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*. Ĝia unua kaj ĉefa celo estis ree emfazi la edukajn avantaĝojn de uzo de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe en elementaj lernejoj. Infanoj pli rapide lernas legi kaj skribi en lingvo kiun ili plene komprenas – aŭ, pli precize, ili suferas malavantaĝon se ili estas devigataj komenci sian lernadon per lingvo kiun ili parte, aŭ eĉ tute, ne komprenas.

En sia mesaĝo al la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en 2018, Audrey Azoulay, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, deklaris: "*Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.*"

Universala Esperanto-Asocio (UEA) gratulas Uneskon kaj UN pro ties kreskanta atento al lingva diverseco, sed emfazas, ke oni ankoraŭ ne dediĉas sufiĉan atenton al la demando de lingva justeco kaj lingva egaleco. Kiel unu el malmultaj neregistaraj organizaĵoj kiuj okupiĝas pri lingvaj demandoj, UEA instigas al Unesko kaj UN doni pli da atento al lingva justeco sur ĉiuj terenoj kaj tute aparte en edukado.

<http://www.esperantoporun.org/> <http://www.linguistic-rights.org/>

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kun helpo de Angela Tellier kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. <https://twitter.com/esperanticsf>, <https://www.facebook.com/esperantic/>
